

# LA SUNO HISPANA

Organo de la hispanoj esperantistoj \* Organo de los esperantistas españoles

Fondinto: AUGUSTO JIMENEZ LOIRA

Redakcio: Mar, 23 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

Direktoro: M. CAPLLIURE \* Senpaga = Gratuito

ENHAVO: Nia reapero.—Sro. Rikardo Codorniu.—Kvazaŭ preĝo.—Al la Esperantistoj hispanaj.—Pri Esperanto.—Paradejo.—Grava Cirkulero.—Academio kaj lingva komitato.—Sección de enseñanza.—Franca Societo por la Propagando de Esperanto.—El Esperanto en una página.

## Nia reapero

LA SUNO HISPANA levigas de nove ĉe la orienta regiono de Hispanujo, la trian fojon. Ĝia fondinto mortis; sed lia memo-ro vivados inter ni por varmigigi nin, kiel la vera Suno lumigas kaj varmigas la tutan hispanlandon ĉiutage.

Ŝajnas ke la katastrofo preskaŭ tutmonda, forpasis. Ĝi devigis la fondinton de tiu-ĉi gazeto malaperigi ĝin, kaj ni aperigas ĝin nune ĉar li promesis fari tion kiam la milito estus fininta.

Jen LA SUNO HISPANA. Ĝi aperas tiel, kiel aperis la unuan fojon: dukolona, dulingva, samformata; kiel ĝin elpensis Sro. Jiménez Loira.

Kial?—Unue ĉar ni opinias ke la milito malantaŭenirigis nian movadon kaj haltigis ĝin tiel ke ni devas alifojie propagandi nian karan lingvon kvazaŭ ni estus reirantaj en la 1903<sup>an</sup> jaron. Plie, ni verkas ĝin dukolone kaj dulingve, ĉar ni konstatis ke ĉu por la hispanlingvanoj ĉu por la nehispanlingvanoj estas preferata ĝi tiamaniere: por la hispanlingvanoj, kiuj

## Nuestra reaparición

EL SOL DE ESPAÑA se eleva de nuevo en la región oriental de España, por tercera vez. Su fundador murió; pero su memoria vivirá entre nosotros para animarnos, como el verdadero Sol ilumina y transmite su calor, un día y otro día, a todo el solar hispano.

Parece que la catástrofe casi mundial, ya pasó. Ella obligó al fundador de esta revista a suspender su publicación, y nosotros la hacemos reaparecer ahora, porque él prometió efectuarlo tan pronto la guerra hubiese acabado.

He ahí EL SOL DE ESPAÑA.—Aparece tal y como vió la primera luz: a dos columnas, bilingüe, de igual tamaño, como lo creó el Sr. Jiménez Loira.

¿Por qué así?—En primer lugar, porque opinamos que la guerra hizo retroceder nuestro movimiento y lo detuvo de manera que debemos otra vez propagar nuestra querida lengua, como si volviésemos a penetrar en el año 1903. Además, le editamos a dos columnas y en forma bilingüe, porque tenemos comprobado que tanto los que hablan la lengua castellana, como los que no la hablan, prefieren nuestra revista de este modo: los que conocen el castellano y aprenden el Esperanto, ya que por él pueden ejer-

lernas esperanton, ĉar per ĝi ili povas ekzercadi kaj ellerni la internacian lingvon: por la nehispanlingvanoj, ĉar estas multaj kiuj lernas hispanan lingvon kaj pere de nia gazeto ili povas ankaŭ perfektigi je la lernado de nia nacia lingvo. Fine, ĝi aperas samformata, ĉar ni volas honori ĝian respektindan devenon.

Do, venu al ni hispanoj! Helpu nin: ne nur per abomena monero, sed per via morala apogo; ne nur per varmigaj vortoj sed per veraj kaj pozitivaj faktoj.

LA REDAKCIO.

citarse y completar el estudio de la lengua internacional; los que no saben el castellano y lo aprenden, ya que por medio de nuestra revista, pueden perfeccionarse en su estudio. Finalmente, aparece de igual tamaño y forma, porque queremos honrar su origen digno de todo nuestro respeto.

¡Venid, pues, hispanos! Auxiliadnos, no sólo mediante la entrega de unas despreciables monedas, sino con vuestro apoyo moral; no tanto con palabras de enardecimiento, como mediante vuestra cooperación traducida en hechos verdaderos y positivos.

LA REDACCIÓN.

## Sro. Rikardo Codornú


La hispana esperantistaro perdis la plej eminentan kaj diligentan pioniron de internacia lingvo. Li ĉeestis la Unuan Kongreson de Esperanto en Boulogne sur Mer; estis la unua Prezidanto de H. S. p. p. de E. kaj honora Prezidanto de la Orienthispana Esperantista Federacio; li verkis multajn librojn, flugfoliojn kaj broŝurojn pri Esperanto, kaj, kiel propagandisto de lingvo internacia, skribis plurajn artikolojn sur la ĵurnaloj *La Verdad* kaj *El Tiempo*, de Murcio; li apartenis al U. E. A. kaj kiel ĝia deligito en Murcio, profitis la okazon propagandi la esperantajn instituciojn, ĉu oficiale ĉu private; fine, ĉiuj samideanoj, kiuj de jam multaj jaroj estis trapasantaj Murcion, kaj havis la okazon viziti lin, ekvidis sur la fasadmuro de lia domo grandan afiŝon, per verdaj literoj dirantan: «Lernu Esperanton, la solan veran internacian lingvon».

LA SUNO HISPANA ankaŭ perdis per la morto de Sro. Codorniu, unu el ĝiaj plej aktivaj propagandistoj, monhelpantoj kaj kleraj kunlaborantoj.

## D. Ricardo Codornú

Los esperantistas españoles han perdido al más eminente y diligente campeón de la lengua internacional. Él asistió al primer Congreso de Esperanto en Boulogne sur Mer; fué el primer presidente de H. S. p. p. de E. y Presidente Honorario de la Federación Esperantista levantina; él escribió muchos libros, hojas sueltas y folletos sobre Esperanto y como propagandista de la lengua internacional, escribió diversos artículos en los diarios *La Verdad* y *El Tiempo*, de Murcia; perteneció a la U. E. A. y como delegado de ella en Murcia aprovechó la ocasión de hacer propaganda de las instituciones esperantistas, tanto pública como particularmente; finalmente, todos los partidarios de la lengua internacional que de mucho tiempo a esta parte han atravesado Murcia, y tuvieron la coyuntura de visitarle, se veían sorprendidos al ver bre la fachada de su casa un rótulo grande que con letras verdes decía: «Aprende el Esperanto, la única verdadera lengua internacional».

EL SOL DE ESPAÑA también ha perdido, con la muerte del señor Codornú, uno de sus más activos propagandistas, protectores y cultos colaboradores.



**Sro. Rikardo Codorniu Stárico**

Arbara ingeniero

*Mortis en Murcia (Hispania),  
la 26.<sup>an</sup> de septiembre 1923.<sup>a</sup>*

**D. Ricardo Codorniu Stárico**

Ingeniero de Montes

*Murió en Murcia (España),  
el 26 de septiembre 1923.*

## Kvazaŭ preĝo

Se vi iam al la kampo irus,  
Kie arboj kreskas foliplene,  
Kaj se vi vin sentas senĉagrene  
Kaj revante—kiel mi dezirus—;  
Vi jam aŭds kvazaŭ se sopirus  
lu dolĉe, milde eĉ bonvene.

### Sciu:

De *Ricardo Codorniu*,  
Jes, de lia la animo  
Dolĉa milda esprimo  
Estos ĝi, kaj ne sopiro  
De l' fervora homamanto  
Kaj fidela pioniro  
De la lingvo Esperanto.

La murmuro de la vento tra folioj,  
Kantoj de la birdoj, de la akvo plaŭdo  
Ĉe la rokfluejoj, estas harmonioj  
Pri li de l' arbaro, kaj glorega laŭdo  
Pri la vivo de l' Inĝeniero fama,  
Kiu familien estis, ja, modelo;  
Por la *Kolegaro*, nobla kaj homama  
Preta ĉiam por hompliboniga celo.

Homoj, birdoj, arboj kaj la plantoj,  
Bonon ŝuldas lin;  
Kaj dankemaj, kvazaŭ preĝoj, estu kantoj,  
Ĉar ĵus lin forportis la *Destin'*!

J. M. ROSENÖRN.

## Al la Esperantistoj hispanaj

Esperanto iras de triumfo en triumfon, sed ne tiel rapide kiel estas dezirinde, kaj ne ne venkante barojn kiuj je ĉiu momento starigas kaj kiuj postulas konstantemon nelacigeblan de nia laboro. Jam oni povas paroli pri nia kara dua lingvo kie ajn kaj antaŭ ĉiuj personoj, kaj eble oni aŭskultos nin, kun miro, kun dubo; eble kuraĝos iu argumenti kontraŭe kaj starigi diskuton, sed malofte aperas jam ĉe la lipoj de iu tia rideto kompatema, malestima, mokema, per kiu oni kutimis respondi ofte niajn argumentojn. Sed ĉio tio ĉi, precize devigas pli kaj pli al laboro intensa, nelacigebla kaj sufiĉe kapabligita.

En la mondo esperantista oni tuŝis la neceson starigi organizon unikan universalan, kiu atentu la subtenon de la institucioj oficialaj de Esperanto kaj kiu donu unuiĝon kaj pli grandan efikon al la agado esperantista universala por atingi la akcepton oficialan de Esperanto de la Registaroj de la popoloj civilizitaj kaj ĝian enkondukon en la instruado oficiala de la ŝtatoj. Antaŭ ol la Kongreso de Helsingfors, en kiu la Unuiĝo estis akceptata, la esperantistoj de unu kaj aliaj landoj celis per tiu aŭ per alia maniero alveni al la Unuiĝo nacia, kaj tiel, en Hispanujo, dum la Kongreso de la Federacio Kataluna Esperantista, kiu okazis en Olot, oni planis atingi nian Unuiĝon pere de Konfederacio el Federacioj regionaj ekzistantaj tiam kaj el tiuj, kiujn oni starigos poste. Tial, oni fondis diversajn Federaciojn regionajn, pro la kons-

## A los Esperantistas españoles

El Esperanto va de triunfo en triunfo, pero no tan deprisa como es de desear, y no sin vencer obstáculos que a cada momento surgen y que requieren la constancia inquebrantable de nuestra labor. Ya se puede hablar de nuestra cara segunda lengua en cualquier lugar y ante todas las gentes, y quizá le escuchen a uno con asombro, con duda; quizá se atreva alguno a argumentar en contra y a entablar discusión, pero rara vez asoma ya a los labios de alguno aquella sonrisa compasiva, desdeñosa, burlona, con que se solía responder frecuentemente a nuestros argumentos. Pero todo esto, precisamente, obliga más y más a una labor intensa, incansable y suficientemente capacitada.

En el mundo esperantista se tocó la necesidad de establecer una organización única universal que atendiese al sostenimiento de las instituciones oficiales del Esperanto y que diera unidad y mayor eficacia a la acción esperantista universal para alcanzar la aceptación oficial del Esperanto por los Gobiernos de los pueblos civilizados y su introducción en la enseñanza oficial de los Estados. Anteriormente al Congreso de Helsingfors, en que la Unidad fué acordada, los esperantistas de unos y otros países procuraron de un modo o de otro llegar a la Unidad nacional, y así, en España, en el Congreso de la Federación Catalana Esperantista, que tuvo lugar en Olot, se planeó conseguir nuestra Unidad mediante una Confederación de las Federaciones regionales existentes entonces y de aquellas que se estableciesen después. Por ello, se fundaron distintas Federaciones regionales, por la constante instigación de los esperantistas de la Federación catalana, y esta fué la razón para que el que suscri-

tanta instigo de la esperantistoj de la Federacio Kataluna, kaj ĉi-tiu estis la pravo de tio ke la subskribanto kun aliaj amikoj fondis la «Zamenhofan», kiel estis ankaŭ pravo por ke nia plorata kamarado kaj sperta arĥitekturisto, Trinidad Soriano, fondu la *Andaluzian*, laborante ambaŭ Federacioj plene interkonsente. *Hispana Esperantisto* estis la movilo de la Esperantismo en nia lando, la ilo por hejti la fajron sanktan de nia idealo; dum la malfeliĉaj tagoj de la milito ĝi estis ilo efika por vekti niajn kamaradojn, kiujn la malespero malproksimigis de niaj vicjoj; ĝi portis for de niaj landlimoj la animon esperantistan hispanan avidantan ĉien konigi ĉion, grandan, kion enhavas nia Hispanujo, farinte tion laŭ mezuro ebla, atinginte la estimon kaj la aplaŭdon de fremduloj; ĝi estis ilo efika por la laboro kiu sukcesis ĉe la I.<sup>a</sup> Kunveno de Barcelona kaj II.<sup>a</sup>, de Zaragoza, estante honoro de tiu, kiu sin turnas al vi, ke, ĉe la du Kunvenoj, triumfis la vera kaj pura idealo esperantista senigita el ĉia mempersonemo, el ĉia partiiemo, el ĉia ideo kiu apartiĝis de la plej pura programo propagandi kaj oficialigi Esperanton. De Zaragoza eliris la decido pri niaj Kongresoj, tial okazis la I.<sup>a</sup> de Valencio kaj okazos la II.<sup>a</sup> en Bilbao, por kiu mi petegas al vi vian apogon moralan kaj materialan kaj vian ĉeston kiel eble plej nombre, ĉar ĉi tiuj manifestacioj estas efike fruktodonaj, kaj same kiel en tiu, nia I.<sup>a</sup> Kongreso, mi prezentis proponon por atingi nian Unuiĝon, ne vundante iajn interesojn, aŭ organizaĵojn starigitajn, harmonie je la interkonsento de Helsingfors, kaj mi ne atingis sukceson; hodiaŭ, pro la cirkonstancoj, kiujn ni travivas kaj

be con otros amigos fundase la «Zamenhof» con su revista *Hispana Esperantisto*, como lo fué también para que nuestro llorado camarada e ilustre arquitecto, D. Trinidad Soriano, fundase la *Andaluzia*, trabajando ambas Federaciones de completo acuerdo. *Hispana Esperantisto* fué el propulsor del Esperantismo en nuestro país, el medio de avivar el fuego sagrado de nuestro ideal en los aciagos días de la guerra mundial; fué instrumento eficaz para despertar a muchos camaradas a quienes el pesimismo había alejado de nuestras filas; llevó fuera de nuestras fronteras el alma esperantista española ansiosa de que se conociera en todas partes todo cuanto de grande encierra nuestra España, haciéndolo en la medida de lo posible, llegando a alcanzar la estimación y el aplauso de los extraños; fué instrumento eficaz para la labor que culminó en la I.<sup>a</sup> Asamblea de Barcelona y II.<sup>a</sup> de Zaragoza, siendo una honra del que se dirige a vosotros que, en las dos Asambleas, triunfase el verdadero y puro ideal esperantista, despojando de todo personalismo, de todo partidismo, de toda idea que se apartase del más limpio programa de propagar y oficializar el Esperanto. De Zaragoza salió la decisión de nuestros Congresos, y así tuvo ocasión el I en Valencia y tendrá ocasión el II en Bilbao, para el que requiero vuestro apoyo moral y material y vuestra asistencia en el mayor número posible, porque estas manifestaciones son de una eficacia excelente; y así como en aquél, en nuestro primer Congreso, presenté una proposición para llegar a nuestra Unidad sin herir ninguna clase de intereses, ni organizaciones establecidas, en armonía con lo acordado en Helsingfors, y no llegué al éxito; hoy, dadas las circunstancias por que atravesamos y consciente de la necesidad de la Unidad perseguida, empiezo por dar el ejemplo, al hacer un llamamiento a ella para todos los que honradamente, sin prejuicios de ninguna clase, sientan el ideal esperantista, que es de unión, no de separación.

konscia je la necesa Unuiĝo celata, mi ekdonas ekzemplon farante alvokon pri ĝi al ĉiuj kiuj honeste, sen antaŭjuĝoj iaj, sentas la idealon esperantan, kiu estas unuiga, ne disiga.

Atingita de mi denove mia ofico en Madrido por iom da jaroj, kiam mi min decidis entrepreni ree mian laboron esperantan, interrompitan de mia militservado en Afriko, alvenas al mi kaj al aliaj kamaradoj de Madrido projektoj kiuj satigas plene la aspirojn de ĉiu esperantisto hispana, kaj ĉiuj interkonsentinte pri la plano ĝenerala, mi konsciis: ke *Hispana Esperantisto* devis cedi la lokon al LA SUNO HISPANA, al la gazeto kiu tiel alte metis la esperantemon hispanan; ke tiu ne reaperu, kiel proponis la kamaradoj valenciaj, sed ke ĝi fandiĝu ĉe ĉi-tiu, kaj ke ĉi-tiu, kiel ĝia nomo diras, estu kiu lumigu egale la esperantistojn hispanajn, estu ilia ligilo por la unuiĝo kaj estu produkto de laboro ĉies kaj ne de laboro persona, kiel estis *Hispana Esperantisto*, por ke ne reinterrompiĝu la vivo de la organo, kiu, subtenonta nian kuniĝon, devas reflekti nian senton kaj taŭgi kiel instigilo por la disvastigo de Esperanto.

Mi deziras al vi sanon por labori kun entuziasmo; unuiĝon, por ke la laboro estu granda kaj fruktodona; prosperojn ĉiajn, por ke vi kunhelpu kiel eble plej, la subtenon de la entrepreno, kiun oni komencas denove, kaj sendas al vi brakpremon fratan, ĉar, spite de ĉio, vi estas miaj fratoj en Esperantujo.

JULIO MANGADA ROSENÖRN.

Madrido, januaro, 1924.

Alcanzado de nuevo mi destino en Madrid para unos cuantos años, cuando me proponía emprender nuevamente mi labor esperantista, interrumpida por mi servicio en Africa, llegan a mí y a otros camaradas de Madrid proyectos de nuestros compañeros de Valencia, proyectos que satisfacen por completo las aspiraciones de todo esperantista español, y todos de acuerdo en el plan general, entendí: que *Hispana Esperantisto* debía ceder el puesto a LA SUNO HISPANA, a la revista que tan alto puso el esperantismo español; que aquella no reaparezca, como proponían los camaradas valencianos, sino que se fundiera en ésta, y que ésta, como su nombre dice, sea la que ilumine por igual a los esperantistas hispanos, sea su lazo de unión, y sea producto de una labor de conjunto y no de una labor personal, como fué *Hispana Esperantisto*, para que no vuelva a interrumpirse la vida del órgano que ha de mantener nuestra unión, reflejar nuestro sentir y servir de acicate a la difusión del Esperanto.

Os deseo salud para trabajar con entusiasmo; unión, para que la labor sea grande y fructífera; prosperidades todas, para que contribuyáis con el auxilio que os sea posible al sostenimiento de la obra que se comienza de nuevo, y os envío un abrazo fraternal, porque, a pesar de todo, sois mis hermanos en *Esperantujo*.

JULIO MANGADA ROSENÖRN.

Madrid, enero, 1924.



## Pri Esperanto

### Opinioj de rimarkindaj eminentuloj

«La elpenso de Zamenhof estas, de la vidpunkto de la tutmonda ekspansio, la plej granda el ĉiuj; ĝi estas destinata renovigi la Mondon de la vidpunkto ekonomia kaj multipliki laŭ miriganta maniero la tutmondan produktadon. Neniam oni povos konscii kial la nacioj ne altrudis al si mem la nepran devon disvastigi la konon pri la helpa lingvo Esperanto laŭ devige, ne ekzamenante ĉu ĝi konvenas al unu aŭ al alia studento entrepreni la necesajn kursojn.

Tiu-ĉi indiferenteco estas vere ĉagreniga, kaj ĝi elpruas pli ol la milito la sovaĝan malamon ĉe kiu kuŝas ankoraŭ la Homaro.

Estas nepre ke la xx.<sup>a</sup> jarcento malaperigu tiel kriman herezaĵon». *Generalo Leman* (Heroa defendinto de *Lieha*).

«Mi mem studis la gramatikojn de Esperanto kaj Ido; mi laboris por kompreni la funkciadon de ambaŭ lingvoj... Ĉu estas ke Ido efektive montras progreson sur Esperanto?

Ni klare respondas: *NE*». *Henri Barbusse*.

«Mi scias ĉiujn argumentojn per kiuj oni kutimas batali kontraŭ la oficialigo de lingvo internacia ĝenerale kaj de Esperanto speciale; sed ankaŭ mi scias, ke la argumentoj favoraj por Esperanto havas pli grandan valoron ol la malfavoraj.

Per mi mem, mi konsciis ke la studo de Esperanto estas grava studo filozofia. Mi konas, malgraŭ mia modesteco kaj ne trograndigante, malmultajn disciplinojn pli bonajn por la spirito ol Esperanto, ne kalkulante ĝian utilecon praktikan. Mi ne celas min elmontri aŭtoritatulo, sed jes

## El Esperanto

### Opiniones de significadas eminentias

«El invento de Zamenhof es, desde el punto de vista de la expansión universal, el más grande de todos; desde el punto de vista económico, está destinado a renovar el mundo y multiplicar de manera admirable la producción mundial. Jamás se podrá concebir cómo las naciones no se impusieron a sí mismas el ineludible deber de divulgar el conocimiento de la lengua auxiliar Esperanto, de una manera obligatoria, no sometiendo a examen de sí conviene a esa o a la otra clase escolar emprender los cursos necesarios para su estudio.

Esta indiferencia es verdaderamente lamentable, y demuestra, más que la guerra, el odio salvaje en que yace todavía la Humanidad.

Es imprescindible que el siglo xx haga desaparecer tan criminal herejía». *General Leman* (Heroico defensor de *Lieja*).

«Yo mismo he estudiado las gramáticas de Ido y de Esperanto; he trabajado para comprender el funcionamiento de ambas lenguas... ¿Acaso el Ido supone algún progreso sobre el Esperanto?

Claramente contestamos: *NO*». *Enrique Barbusse*.

«Conozco todos los argumentos por los que se acostumbra a combatir contra la oficialización de la lengua internacional en general y del Esperanto en particular; pero también sé que los argumentos favorables al Esperanto tienen valor más grande que los desfavorables.

Por mí mismo he llegado a la conclusión de que el estudio del Esperanto es un estudio filosófico de importancia. Conozco, a pesar de mi modestia y sin exagerar nada, muy pocas disciplinas mejores para el espíritu que el Esperanto, sin tener en cuenta su utilidad práctica. No



spertulo: mi studis proksimume dekok lingvojn eŭropajn kaj orientajn, malnovajn kaj novajn; tial, mi estas sufiĉe kapablata por paroli kiel praktika filologo, kaj min fundamentante sur miaj spertoj, sur miaj personaj konvinkigo kaj impresoj, deklari ke, de la literatura vidpunkto, Esperanto havas, kiel interkomprenilo, malmutajn konkurantojn inter la aliaj lingvoj historiaj kaj la naturaj aŭ naciaj.» *Charles Sarolea* (Profesoro pri franca literaturo de la Universitato de Edimburgo. El parolado je la 23.<sup>a</sup> de oktobro, 1919, ĉe la *United Free Assembly Hall*).

me propono montrarme como autoridad en la materia, aunque sí como *hombre experimentado*. Yo he estudiado aproximadamente dieciocho idiomas europeos y orientales, modernos y antiguos, así es que estoy suficientemente capacitado para hablar como filólogo experimentado, y fundándome en mis propias experiencias, en mis personales impresión y convencimiento, declarar que, bajo el punto de vista literario, el Esperanto tiene, como instrumento de comprensión recíproca, muy pocos concurrentes entre las demás lenguas, tanto históricas como modernas o nacionales». *Charles Sarolea* (Profesor de literatura francesa de la Universidad de Edimburgo. De su discurso el día 23 de octubre de 1919 en la *United Free Assembly Hall*).

«Esperanto faris same kiel akrobato, ekvilibrigante ĉe si mem la *muzikon* kaj la *alĝebro*n, la emocian esprimon kaj la logikan esprimon». *Charles Bandois*. (Eminenta poeto de franca lingvo, profesoro de la Universitato de Ĝenevo).

«El Esperanto ha hecho lo mismo que un acróbata, equilibrando en sí mismo la «música» y el «álgebra», la expresión que emociona y la lógica de la expresión». *Charles Bandois* (eminente poeta de lengua francesa, profesor de la Universidad de Ginebra).

«La Societo de Nacioj, por vivi, devas esti societo ne el regatoj, sed de popoloj. Ĉi tiuj bezonas, por ke la milito estu forigata, *sin koni reciproke*. Lingvo helpa internacia estas nepre necesa al ili. Mi estas tute konvinkata, ke Esperanto plenumas kiel eble plejbone tiun neceson, kaj ke ĉi tiu lingvo helpos starigi la tutmondan pacon». *Justin Godart*. (Deputato franca *L' Ere Nowelle*, 6 aprilo 1922).

«La Sociedad de las Naciones, para vivir, ha de ser sociedad no de súbditos, sino de pueblos. Estos han menester, para que la guerra sea abolida, *conocerse recíprocamente*. La lengua auxiliar internacional es de todo punto necesaria para ellos. Yo estoy totalmente convencido que Esperanto cumple lo mejor posible esta necesidad, y que esta lengua ayudará a la implantación de la paz universal». *Justin Godart* (diputado francés. *L' Ere Nowelle*, 6 abril 1922).

«Esperanto estas idioma preciza, kiel la franca lingvo; harmonia, kiel la itala; kapabla, kiel la greka». *Charles Richet* (Profesoro de la Universitato de Paris).

«El Esperanto es una lengua precisa, como la francesa; armoniosa, como la italiana; capaz, como la griega». *Charles Richet* (Profesor de la Universidad de París).

Fine, el proksimume 4148 vortoj de la vortaro Esperanto-Hispana de Ingla-

Finalmente, de aproximadamente 4.148 voces del diccionario Esperanto-

kaj López Villanueva, 2511 apenaŭ varias de la hispanaj kaj 744 estas konataj de kiu ajn mezinstruito; nu, konsciu ĉu Esperanto estas facila por ni kaj atentu, por plejbona konscio rapida, ke la gramatiko konsistas el dekseks reguloj sen esceptoj. Dek centimojn kostas ŝlosilo per kiu oni povos konstati la aserton; mendu ĝin al S-ro. Manuel Esteban. (Antonio Acuña, 3, Madrid. Est. ix).

Español de Inglada y López Villanueva, 2.511 apenas varían de las españolas, y 744 son conocidas de cualquier persona medianamente instruída; sacad, pues, la consecuencia de si el Esperanto es fácil para nosotros y *tened en cuenta*, para comprenderlo mejor, que su gramática consta de dieciséis reglas sin excepción. Diez céntimos cuesta la clave por la que se puede comprobar esta afirmación; encargadla a D. Manuel Esteban, Antonio Acuña, 3, Madrid. Est. ix.

## PAROLEJO

### Respondo al «Teknikaj Terminoj», n.ºm. 245

Mi ne estas Akademiano, mi nur estas advokato kaj okaza maristo, sed mi, kiel esperantisto, ankaŭ deziras labori ĉe la marista esperanta vortaro. En tiu ĉi senco, mi volas respondi al mia amiko Sro. Robert Kreuz, rilate al la demando de li farita, sub tiu-ĉi rubriko de *Esperanto Triumfonta*, eldona numero 172.<sup>a</sup>

Hispane, ni nomas *Alisio* generale, la venton sensaĝan (?), kiu blivas ĉu sur la Atlantika ĉu sur la Hinduja Maroj; sed tiun lastan venton ni nomas speciale *Monzon*. (La deveno de tiu vorto estas la araba *Mancim*, kiu signifas *Sezono*). Laŭ tio mi opinias private ke ni ne povas nomi sammaniere ambaŭ ventojn, se ni volas esprimi ĝuste nian penson. Sur tiu bazo mi fundamentas mian privatan tezon kaj el ĝi mi eltiras ke ĉar oni nomas la unuajn ventojn: *Alizes* (France), *Alisei* (Itale), *Aliseos* (Portugale) kaj *Alisios* (Hispane),

t. e. kvar maristaj nacioj, kiuj havas la saman radikon por esprimi la saman sencon, kaj nur la angloj nomas tiujn ventojn *Trade Winds* kaj la germanoj *Passatwinds*, t. e. du nacioj kiuj havas malsaman radikon por la sama vorto, ja mi povas konkludi ke la triumfo devas aparteni al la kvar nacioj kiuj uzas la saman radikon, laŭ Zamenhofa principo de internacieco.

Rilate al la *Alisea Vento* kiu blovas sur la Hinduja Maro, la francoj nomas ĝin *Mousson*, la italoj *Monzone*, la angloj *Monsoon*, la portugaloj *Monção*, kaj ni la hispanoj *Monzon*; nur la germanoj nomas tiun venton *Passatwind*. Do, Sro. Boirac estas iomete prava...

Krom tio, mi ne estas tute konsenta pri *Sensaĝa Vento* (laŭ Dro. Zamenhof) por ambaŭ ventoj, tial ke la *Alisa* aŭ *Alisea Vento*, jes, estas konstanta, sed la *Monzona Vento* blovas dum la vintro laŭ nordorienta direkto kaj dum la somero laŭ sudokcidenta.

ANDRÉS PIÑÓ,  
Delegito de U. E. A.

Valencia (Hispanio).



# IMPORTANTE CIRCULAR

(GRAVA CIRKULERO)

**OFICIALIGO DE ESPERANTO en la internaciaj administraciaj rilatoj de la Poŝto, Telegrafo kaj Telefono**

*Grava sciigo kaj rekomendo*

La XV-a akceptis en Nürnberg unanime rezolucion favoran al enkonduko de Esperanto en la internacian servon de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono kaj al la akcepto de Esperanto kiel telegraman lingvon «klara».

La Internacia Ligo de Esperantaj Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj preparis petrikon al la du Internaciaj Unuiĝoj de Poŝto kaj Telegrafo, sed necesas aldonon de multnombraj bonaj esp. kaj neesp. subskriboj ĉiulandaj por efika sukceso.

Mil kvarcent listoj estas jam forsenditaj k. a. estas haveblaj ĉe la subskribinto. La afero estas gravega por Esp., ni do petas la komitatanojn, redaktorojn, fak- kaj grupestrojn, kiel precipe la estimatajn delegitojn de UEA, helpu nin, subskribi kaj subskribigu, kaj resendu al ni *nur tutplenigitajn* listojn kun la samaj subskriboj sur ambaŭ listoj (Poŝto kaj Telegrafo). En ĉiu urbo troviĝas sufiĉe da esp-istoj aŭ esp-emiaj personoj por plenigi almenaŭ du listoparojn kun subskriboj. Ne plenajn subskribo-listojn ni resendos por finpleno.

Ĝis nun ni ricevis nur 133 listoparojn kun en tute 6730 duoblaj subskriboj. Ili plejparte enhavas multajn bonkvalitajn subskribojn, kiel ekzemple de altaj oficistoj, konsilistoj, firmaoj kaj estroj de

**OFICIALIDAD DEL ESPERANTO en las relaciones internacionales administrativas de Correos, Telégrafos y : : : : Teléfonos : : : :**

*Importante noticia y recomendación*

El XV Congreso en Nürnberg aceptó, por unanimidad, una resolución favorable a la adopción del Esperanto en el servicio internacional de Correos, Telégrafos y Teléfonos, y la admisión del Esperanto como lenguaje telegráfico «claro».

La Liga Internacional de oficiales telegráfico-postales esperantistas, preparó una solicitud a las dos Uniones Internacionales de Correos y de Telégrafos, pero necesita la adición de muy numerosas y buenas rúbricas, tanto de esperantistas como de no esperantistas de todos los países para obtener éxito eficaz.

Mil cuatrocientas listas han sido ya enviadas y otras están a disposición en casa del que suscribe. El asunto es de suma importancia para el Esperanto; por tanto, rogamos a todos los comités, redactores y jefes de sección y de grupo y también a los estimados delegados de U. E. A. que nos ayuden suscribiendo y haciendo suscribir dichas listas, devolviéndolas después de llenar completamente con las mismas firmas en ambas (Correos y Telégrafos). En toda ciudad se encuentra suficiente número de esperantistas o amigos del Esperanto, para llenar de firmas, por lo menos, dos pares de listas. Las incompletas serán devueltas para que se completen.

Hasta ahora hemos recibido solamente 133 pares de listas, conteniendo en total 6730 firmas dobles. La mayor parte contienen muchas rúbricas de calidad, como, por ejemplo, de altos empleados, consejeros, casas de comercio y jefes de

diverspecaj societoj. Eĉ 5 direktoroj de internaciaj oficejoj subskribis al ni, sed tio ankoraŭ tute ne sufiĉas. El kelkaj landoj ni ĝis nun preskaŭ neniujn subskribojn ricevis, sed ni bezonas la kunhelpon de ĉiuj. Ni kunmetis cirkuleron, kiu klarigas ĉion.

Kun kora antaŭdanko kaj saluto,

por la Internacia Ligo de Esperantaj Poŝtkaj Telegraf-Oficistoj (ILEPTO)

*Dr. Ed. Spielmann*, 2a vicprezidanto,  
P. K. 174, Transit, Bern (Svislando).

societades de diversas clases. Hasta cinco directores de oficinas internacionales nos han enviado su adhesión, pero esto todavía no es suficiente. De algunos países hasta el presente no hemos recibido adhesiones, más nosotros necesitamos la colaboración de todos. Acompañamos a las listas circular explicativa.

Con saludo cordial y gracias anticipadas,

Por la Liga Internacional de Oficiales Esperantistas de Correos y Telégrafos (ILEPTO)

*Dr. Ed. Spielmann*, 2.º Vicepresidente,  
P. K. 174, Transit, Berna (Suiza).

## AKADEMIO KAJ LINGVA KOMITATO

Post la diversaj elektoj de 1923, la Akademio konsistas nun el:

Prof. TH. CART, *Prezidanto* S-ro J. M. WARDEN kaj, D-ro J. DIETTERLE, *Vic-prezidantoj*, Prof. E. GROSJEAN-MAUPIN, D-ro W. LIPPMANN, D-ro E. PRIVAT, *Direktoroj de la fakaj Sekcioj*, S-ro W. BAILEY, Prof. P. CHRISTALLER, D-ro P. CORRET, Prof. A. DOMBROWSKI, [S-ro E. EVSTIFÉIEFF], S-ro V. INGLADA, S-ro G. ISBRÜCKER, S-ro E. KÜHNEL, S-ro P. DE LENGYEL, Prof. B. MIGLIORINI, S-ro E. A. MILLIDGE, S-ro P. NYLÉN, *membroj*.

*Akademijaj Korespondantoj*: S-ro ROLLET DE L' ISLE (Scienca kaj Teknika Vortaro), S-ro W. SETÁLÁ (Finna lingvo), S-ro M. SOLÁ (Kataluna), S-ro A. TELLINI (Ladina), D-ro LEONO ZAMENHOF (Pola).

*Sekcio Komuna Vortaro*: Prof. GROSJEAN-MAUPIN, *Direktoro*, S-roj BAILEY, MIGLIORINI, MILLIDGE, NYLÉN, BÜNEMANN, SOLÁ, *membroj*.

*Sekcio Gramatiko*: D-ro LIPPMANN, *Direktoro*, S-roj CHRISTALLER, CORRET, DE LENGYEL, COLLINSON, STOJAN, *membroj*.

*Sekcio Konkursoj kaj Premioj*: D-ro PRIVAT, *Direktoro*, S-roj ISBRÜCKER, KÜHNEL, S-ro HANKEL, S-roj DE MÉNIL, STRÉELE, *membroj*.

\* \* \*

Mankas ankoraŭ, por ke niaj Lingvaj Institutioj estu *plene* reorganizitaj, granda parto de la rusingva reprezentantaro. Bedaŭrinde sen respondo ĝis nun restis la leteroj de l' Prezidanto, ĉu ĉar ilin ne ricevis la korespondantoj en Rusujo, ĉu ĉar iliaj respondoj ne alvenis Francujon. Tamen oni rajtas esperi, ke la petitajn sciigojn la Akademio ricevos fine kaj ke antaŭ la Viena Kongreso ĉio estos en plena ordo.

\* \* \*

*Sekcio Komuna Vortaro.*—La Esperantistoj, jam sufiĉe multnombraj, kiuj sendas al la faka Direktoro manuskriptojn por traĝado rilate la vortaron, estas petataj sendi kun la manuskripto 10 francajn frankojn (aŭ saman valoron). La Direktoro sciigos poste la aŭtoron pri la de li definitive pagota sumo, kiu dependas de la amplekso kaj de la pli malpli bona stila valoro de l' manuskripto.

\* \* \*

*En presado.*—Pro. GROSJEAN-MAUPIN: *Oficiala Radikaro*, kun tradukoj en franca, angla kaj germana lingvoj kaj esperanta difino de l' vortoj, kies signifo povas esti duba.

La sama kun tradukoj en aliaj lingvoj aperos poste.

\* \* \*

Malprave oni riproĉus la Lingvajn Institutiojn, ke tro modestaj estas iliaj laboroj (*3-a Aldono, Vortaro de la oficialaj radikoj, Korekto de la eraraj tradukoj en U. V.*). Oni ne rajtas forgesi, ke post longa milito la unua tasko estis ilia reorganizado kaj aliflanke ke, en la postmilita periodo, kiam ĉiu nacio emas vivi «ĉe si», kiam la internaciaj rilatoj preskaŭ ne plu ekzistas, kiam en multaj rondoj malpli sentebla fariĝis la bezono pri internacia lingvo, kiam la financa demando ĉion malfaciligas, modesteco estas forto: modesta fajro, se tiuj, kiuj zorgas pri ĝi, estas *obstine persistemaj*, daŭras, dum paja fajrego momente brilas, sed baldaŭ estingiĝas de si mem aŭ sub la akvo de la alkurintaj pumpistoj!—Ni estu obstine persistemaj, ni laboru senbrue kaj, kiam pli helaj tagoj venos, kiujn ni ankaŭ sur diversaj kampoj klopodos por kiel eble baldaŭigi... tiam, se ni Esperantistoj, dank' al nia severa lingva disciplino—de *ĉin* pri *ĉin* punktoj fine akceptita—sciis konservi al nia lingvo ĝian internacian *unuecon*, ĝian vortaran simplecon, ĝian komunan facilecon, nenia forto, nenia kontraŭbato malhelpos la triumfon de nia Zamenhofa Esperanto!

TH. CART

Prezidanto de la L. K.  
kaj de ĝia Akademio.

20 decembro, 1923.



## SECCIÓN DE ENSEÑANZA

Bajo este título dejamos abierta una Sección dedicada exclusivamente a facilitar el estudio del Esperanto a aquellos de nuestros consocios que lo deseen. Ocurre que muchos empiezan el estudio del idioma internacional sin profesor y sin posibilidad de consultar sus dudas o dificultades con nadie, por residir en lugares donde no es fácil encontrar personas capacitadas para resolver aquéllas, lo cual ocasiona a veces el abandono del mismo estudio.

Los que se hallen en este caso pueden, pues, dirigirse a nosotros, exponiéndonos cuantas dudas se les ofrezcan y pidiéndonos las explicaciones que necesiten, seguros de que hemos de contestarles cuan extensamente lo permita el espacio de esta Revista destinado a tal fin.

Cada una de nuestras respuestas llevará su correspondiente número de orden, para poder hacer referencia a ellas fácilmente y evitar repeticiones inútiles, y serán dirigidas a las iniciales del nombre y apellido de nuestros comunicantes y, naturalmente, redactadas en castellano.

Esperamos, pues, las susodichas preguntas, que deberán ser lo más concretas y claras posible.

Foso.

Valencia, enero, 1924.

### Franca Societo por la Propagando de Esperanto

Beauvais'a (Oise) Grupo

AL ĈIUJ DELEGITOJ DE U. E. A.

KARAJ GESAMIDEANOJ,

Por nia kara lingvo, kaj precipe por la Paco ni insiste petas de vi ĉiuj ke vi bonvolu traduki nacilingve la ĉi-suban tekston kaj klopodi por enpresigi vian tradukon en kiel eble plej multe da viaj naciaj gazetoj kaj revuoj.

Sincerajn samideanajn antaŭdankojn.

Por la Grupo,  
*La Prezidanto-fondinto,*  
L. DEMARCY.  
Licencio de la Ministerio de Instrucción Pública.

### Sociedad Francesa para la propaganda del Esperanto

Grupo de Beauvais (Oise)

A TODOS LOS DELEGADOS DE U. E. A.

QUERIDOS SAMIDEANOS:

Por nuestra querida lengua y principalmente por la Paz, pedimos con insistencia de todos vosotros que tengáis a bien traducir al idioma nacional el texto siguiente, y que procuréis publicar vuestra traducción en el mayor número posible de vuestros periódicos y revistas nacionales.

Sinceramente anticipadas de vuestros correligionarios.

Por el Grupo,  
*El Presidente fundador,*  
L. DEMARCY  
Licenciado en Derecho.

*Kio estas Esperanto?*

Esperanto estas tre simpla helpa lingvo, piun jam uzas miloj da ĉiulandaj personoj, parolantaj multegon da malsamaj lingvoj, kaj kiu permesas al ili korespondadi kaj interparoladi reciproke sen interpretistoj, tiel facile, kiel se ĉiuj havus la saman nacian lingvon.

Kaj des pli kreskas ĉie ilia nombro, ĵu pli fariĝas granda por ĉiu el ili la utileco de tiu helpa komuna lingvo, sama por ĉiuj.

Esperanto cetere estas tiom facila ke kiu ajn povas ĝin lerni en la daŭro de nur kelkaj semajnoj, eĉ, se bezonas, sola kaj sen Instruanto.

Tial, malgraŭ iliaj multoblaj malsamaj lingvoj, la homoj rapide sukcesas sin ĉiujn kompreni sen la malhelpaĵo, se ĉiuj konsentus fari la etan penon necesan por lerni la Zamenhofan lingvon.

Kaj sin ĉiujn komprenante, ili rapide interkonsentus por trafi ke ĉiuj iliaj estrantoj kunhelpu organizi la Vere ĝeneralan Societon de l' Nacioj, sola rimedo praktika kaj efika. «*Por forigi tiun krimon: La Milito*» (1).

Ke, tiom por ilia persona kiom por la ĝenerala profito, ĉiuj amikoj de l' Progreso kaj de l' Paco bonvolu do helpi nin kogni kaj lernigi kiel eble plej rapide, ĉie kaj de ĉiuj, Esperanton.

## LA BEAUVAIS' A ESPERANTISTA GRUPO.

(1) Sub tiu sama titolo «*Por forigi tiun krimon: La Milito*» grandanima viro, Sinjoro H. DEMONT, Advokato apud la Pariza Apelacia Kortumo, 130, RUE DE RENNES, PARIS (6<sup>e</sup>), starigis grandan universalan Asocion celantan trafi ke en ĉiuj landoj la famo insiste petu la aliformigon de la nuna Societo de l' Nacioj je la Vere ĝenerala Societo de l' Nacioj. Ke ĉiuj do, kiuj estas pretaj por helpi lin pri lia entrepreno, bonvolu sciigi lin pri tio, skribante al li per Esperanto. Li volonte donos al ili senpage ĉiujn necesajn sciigojn.

*Ĝuĉe es el Esperanto?*

Esperanto es una lengua auxiliar muy sencilla que ya usan miles de personas de todos los países, hablando multitud de lenguas distintas, la cual les permite tener correspondencia y hablar entre sí recíprocamente sin intérpretes, tan fácilmente como si todos tuviesen la misma lengua nacional.

Y tanto crece en todas partes su número, cuanto más grande es para cada uno la utilidad de este idioma auxiliar común, igual para todos.

Por lo demás el Esperanto es tan fácil, que cualquiera puede aprenderlo en el espacio de unas semanas solamente, y hasta si es necesario, solo y sin instructor.

Así, pues, a pesar de sus múltiples y diversas lenguas, los hombres conseguirían comprenderse unos a los otros rápidamente y sin ningún inconveniente, si todos, de acuerdo, se tomaran la pequeña molestia necesaria para aprender la lengua de Zamenhof.

Y, comprendiéndose todos, rápidamente llegarían a un acuerdo para conseguir que todos sus gobernantes ayudasen a organizar la verdadera y general Sociedad de las Naciones, único remedio práctico y eficaz *Para abolir ese crimen: La Guerra* (1).

Tanto para su provecho personal, como para el general, suplicamos que todos los amigos del Progreso y de la Paz quieran ayudarnos a dar a conocer e instruir el Esperanto lo más rápidamente posible, en todas partes, y de todos.

## GRUPO ESPERANTISTA DE BEAUVAIS.

(1) Bajo este mismo título: *Para abolir ese crimen: La Guerra*, un generoso señor, MR. H. DEMONT, abogado del Tribunal de Apelación de París, 130, rue de Rennes, Paris (6<sup>e</sup>), ha establecido una gran asociación universal, que se propone conseguir que en todos los países, la voz pública, pida con insistencia la transformación de la actual Sociedad de las Naciones en una Verdadera y General Sociedad de las Naciones. Así, pues, todos los que estén dispuestos a ayudarle en su empresa, diríjase al mismo con este objeto, escribiéndole en Esperanto. Dicho señor contestará y dará gratuitamente toda clase de informes.

## El Esperanto en una página

Pronunciación de las letras:

a, e, i, o, u, ŭ, b, d, f, k, l, m, n, p, r, s, t, v, lo mismo que en castellano.

c = tse, ĉ = ch, ĝ = gue, ĥ = j, ĥ = aspirada, j = y,

ĝ = dche, j = yche, ŝ = sche, z = dse

El acento recae siempre en la penúltima sílaba.

Artículo único, *la* = el, la, los, las

El sustantivo singular termina en *o*: *homo* (hombre), *kato* (gato).

» adjetivo » » *a*: *homa* (humano), *kata* (gatuno).

» infinitivo. . . . . *i*: *ami* (amar), *skribi* (escribir).

» adverbio. . . . . *e*: *bone* (bien), *plene* (completamente).

El plural se forma añadiendo al singular una *j*: *libroj* (libros), *katoj* (gatos)—pronúnciese *libroy*, *káttoy*.

Terminaciones de los tiempos y modos del verbo:

|            |            |            |                               |                       |            |
|------------|------------|------------|-------------------------------|-----------------------|------------|
| <i>as</i>  | <i>is</i>  | <i>os</i>  | <i>us</i>                     | <i>u</i>              |            |
| presente   | pasado     | futuro     | condicional                   | imperativo-subjuntivo |            |
| <i>ant</i> | <i>int</i> | <i>ont</i> | para los participios activos. |                       |            |
| <i>at</i>  | <i>it</i>  | <i>ot</i>  | »                             | »                     | » pasivos. |

Unico verbo auxiliar *esti* (ser, estar o haber), para los tiempos compuestos.

Ejemplos: *mi amas* (yo amo), *ili amas* (ellos aman), *vi amis* (usted amó), *ni amos* (nosotros amaremos), *li amus* (él amaría), *amu* (ama tú), *ki ili amu* (que ellos amen), *mi estas amanta* (yo estoy amando), *vi estas amonta* (usted ha de amar), *li estas amata* (él es amado), *mi estos amata* (yo seré amado)...

Las preposiciones forman la declinación, como en castellano, así: *de la patro* (del padre), *al la historio* (a la historia), menos el acusativo, que termina en *n*: *mi legas la libron* (yo leo el libro).